

## & La putoro kaj la kokinoj:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 135 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Filino de Torkil.>

### (#Melodio:

<1,7:27>

(oso /sodo dodo rere sooso;so soomi;so soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Pu/toro aŭdis, ke malsanas (×: – **ja danci** –) kokinoj, kaj ĝi ion planas: (×: – **Bone min ŝancis, ; jen mi volas plankon antaŭen danci, ; kvankam vi mian vivon minacis, ; bone min ŝancis.**)

'2 Kiel doktoro medicina ; alprenas ĝi medikamentojn .....

'3 kaj kuracistajn instrumentojn, ; kaj iras al la stal' kokina. ....

'4 Ĝi antaŭ ties pordo haltas, ; demandas, kiel ili fartas. ....

'5 Responde la kokinoj diras: ; “Tre bone tuj, se vi foriras.” .....